（グーテンベルクオーケストラ社菅付雅信氏よりの回答）

1：本誌が『Esperanto Culture Magazine』という名称を使った経緯

1985 年のモリサ・フェンレイと坂本龍一の競作ダンス公演「ESPERANTO」を拝見し、そこからインスピレーションを得ております。エスペラント語を知ったのはそれからですが、その創設者のザメンホフの考えにさらに触発されながらも、単なる言葉の領域だけに留まらず、国を超えてコミュニケーションすることのメタファーとして、この「エスペラント」に触発されたメディアを作りたいと常々考えていました。そのことは創刊号の「EDITOR'S LETTER」にも明確に書いております。

ですので、エスペラント語を学ぶ人たちや会話する人々が存在することは知っておりますし、「ESPERANTO」という名称のメディアが世界にいくつも存在することは存じてますが、それらに触発されながらも、かなり違うコンテンツとデザインを持ったものとして『Esperanto Culture Magazine』という名称を考えた次第です。

ただ、エスペラントをメタファーとして用いつつ、英語テキストの雑誌であることは、一見紛らわしい印象を与えることはあると認識しています。そのあたりのことは前述の「EDITOR'S LETTER」、そして本誌のアートディレクションを担当している EXPERIMENTAL JETSET のエッセイを読んでいただけると、なぜメタファーとしてのエスペラントという言葉を使っているのかを理解していただければと思います。

そして、国際的なコミュニケーションや国際的な文化交流を考える上で、エスペラントというのは素晴らしいメタファーだと思っており、それは本誌の主に外国人が中心となる編集スタッフ、そして9割が外国人であるコントリビューターにも、このメタファーはよく通じていると編集作業を通して実感しております。

2：商標登録の件

日本国内における、出版物の領域においてのみ、『Esperanto Culture Magazine』という商標登録の申請をしております。しかし、これはほかのエスペラントの表記を使った出版活動に制限をかける意図は全くないことを明言します。あくまで国内における、全く同名の出版物だけはやめて欲しいと思ってます。日本で刊行されている多くの雑誌がビジネスをスムーズにするために、誌名を商標登録しているのと同じように、全く同名のものだけは避けてもらいたいと思ってます。またこの申請は国内だけに関するものです。

3： オンライン・コミュニティの「Esperanto Culture Community」は、オンライン・コミュニティの運営会社と共同で進めているものですが、こちらの方はこちらの告知の後に他の方が全く同名のコミュニティを開始したようです。こちらはその名前での商標登録申請もしていませんし、商標で揉めることを望んでませんので、この名称を大きく変えるつもりで、既に関係者と協議を始めております。年明けに修正タイトルを発表する予定です。

4： 本誌を読んでいただければ、エスペラントをメタファーとして用いた誌名で、国際的なコミュニケーションや国際的な文化交流を促進する雑誌であることは理解していただけると思っております。そしてその考えは、ザメンホフがエスペラント語という言語を超えて伝えたかった考えではないかと、勝手ながら想像しております。ザメンホフにとって、エスペラント語の普及がゴールではなかったはずです。私たちにとっても『Esperanto Culture Magazine』の普及がゴールではありません。

5: また国内外の、エスペラント語を学び、話し、普及させようという人々とその活動には大いに敬意をもっております。その理念と、この雑誌のミッションは共通するものがあると信じております。ですので、創刊号を出す前から、日本エスペラント協会と何か共同作業が出来ればと考えながらも慌ただしく創刊号の作業をやっていくなかで、すぐにそのような連絡をこちらから取ることが出来なかったのは申し訳なかったと思っております。しかし、創刊2号目から本誌に日本エスペラント協会の協力を得たエスペラント語のページを設けるつもりでいることは、既に北川理事長にお伝えしたとおりです。

6: さらに 1 月から、本誌のウェブが本格的に始まる予定ですが、そこに日本語訳だけでなく、エスペラント語訳も掲載したいと考えております。予算の都合上、誌面全体の完全なる翻訳は難しいかと思っておりますが、一部抜粋の訳は載せるつもりです。

このように『Esperanto Culture Magazine』は雑誌やウェブを通しても、英語テキストの普及を目指すわけでも、日本語やエスペラント語の普及を目指すことをゴールにしておりません。それが副次的に広がればとは思いますが、主な目的は前述したように、国際的なコミュニケーションや国際的な文化交流を促進することです。

それを日本の出版活動で実現させることの難しさは 30 年以上の編集歴で十二分にわかっているつもりですが、それでもこの出版活動が次なる世界のための種子となることを願って、創刊にこぎつけた次第です。その無謀さと難易度と理念の高さも、勝手ながらザメンホフの志を受け継いだつもりでおります。

以上、長文になりますが、ご理解いただければと願っております。

転載・公表はご自由にお任せいたしますが、引用する場合は、原文どおり改変なしでお願いします。

『Esperanto Culture Magazine』編集長
グーテンベルクオーケストラ代表取締役／編集者
菅付雅信
2020 年 12 月 28 日

Respondo de s-ro Sugatsuke de Gutenberg Orchestra

tradukita de Japana Esperanto-Instituto

1. La kialo uzi la nomon “Esperanto Culture Magazine” al nia gazeto

Mi origine renkontiĝis kun la ideo “Esperanto” jam en 1985, kiam mi spektis la dancoprezentadon de “ESPERANTO” de Molissa Fenley kun la muziko de Ryuichi Sakamoto. Tiam grandan inspiron mi ricevis. Post la spektado mi ekesploris la lingvon Esperanto kaj impresite de la ideo de Zamenhof, jam longan tempon mi volis krei novan periodaĵon, kiu utiligas “Esperanto”-n kiel metaforon de transnacia komunikado. Tion mi jam klare skribis en “la letero de ĉefredaktoro (EDITOR’S LETTER)” de la unua numero.

Mi bone komprenas, ke troviĝas homoj, kiuj lernas kaj uzas la lingvon Esperanto kaj ke ekzistas multaj periodaĵoj kun la nomo “Esperanto” en la mondo. Mi tamen inspirite de ili elpensis la nomon “Esperanto Culture Magazine” kun tute alia enhavo kaj desegnaĵo.

Mi tamen konscias, ke la anglalingva magazino uzanta la vorton Esperanto kiel metaforon povus doni konfuzan impreson. Se vi legos supre menciitan “la letero de ĉefredaktoro”-n kaj la eseon de EXPERIMENTAL JETSET, nia artodirektistaro, vi povos kompreni kial ni uzas la vorton Esperanto kiel metaforon.

Mi pensas, ke Esperanto estas admirinda metaforo por internacia komunikado kaj kultura interŝanĝo, kaj fakte tra redaktlaboro mi konstatis, ke tiu metaforo bone funkcias inter niaj redaktaj stabanoj ĉefe el nejapanoj kaj kontribuantoj el kiuj 90% estas eksterlandanoj.

2. Pri la varmarko

Ni petis registron de varmarko “Esperanto Culture Magazine” nur en la kampo de eldonaĵoj ene de Japanio. Mi deklaras, ke per tio ni havas nenian intencon limigi eldonagadon de ajna eldonaĵo kun skribo de Esperanto. Ni volas, ke neniu en Japanio eldonu samnomajn eldonaĵojn. Ni nur sekvis la kutimon registri varmarkon por glate irigi komercon, kaj tiu registrado rilatas nur enlande.

3. Reta komunumo “Esperanto Culture Community” estas projekto, kiun ni kunfunkciigas kun firmao administranta retajn komunumojn. Post la lanĉo de tiu ĉi projekto, ŝajne iu alia lanĉis komunumon kun tute sama nomo. Ni ne petis registri tiun nomon en la patentoficejo, kaj ne volas havi konfliktojn rilate tion, do nun ni komencis interkonsiliĝi, ke ni tute ŝanĝu la nomon. Pri la komunumo ni anoncos modifitan nomon komence de la venonta jaro.

4. Se vi bone legos nian magazinon, vi certe komprenos, ke la nomo Esperanto estas uzita kiel metaforo, kaj ĝi celas akceli internacian komunikadon kaj interŝanĝon de kulturo. Tiu ideo, laŭ mia kompreno, estas la ideo de Zamenhof, kiun li volis diri malantaŭ la lingvo Esperanto. Povus esti, ke por Zamenhof disvastiĝo de la lingvo Esperanto ne estis la fina celo. Same por ni, popularigo de "Esperanto Culture Magazine" ne estas nia fina celo.

5. Ni respektas homojn enlandajn kaj eksterlandajn, kiuj lernas, parolas kaj penas disvastigi Esperanton, kaj mi kredas, ke ilia motivo kaj la misio de tiu ĉi magazino havas ion komunan. Kaj pro tio ni fakte volis havi kontakton kun Japana Esperanto-Instituto por iel kunlabori, antaŭ ol eldoni nian unuan numeron. Sed pro tro da laboro por lanĉi la gazeton, ni maltrafis okazon, pri kio ni devas pardonpeti. Intertempe, ni jam informis la prezidanton de Japana Esperanto-Instituto, s-inon Kitagawa, ke ni pretas dediĉi esperantlingvajn paĝojn ekde la dua numero kun la helpo de JEI.

6. Krome, ekde januaro komencos aperi reta versio de nia magazino, kaj tie ni intencas aperigi tradukon ne nur en la japanan lingvon sed ankaŭ en Esperanton, tamen nur por parto de la magazino anstataŭ por la tuto, kio kostas super nia buĝeto, bedaŭrinde.

Kiel mi jam skribis, la magazino "Esperanto Culture Magazine" aŭ libroforme aŭ rete, ne celas la disvastigon de anglalingvaj tekstoj, nek tiujn de la japana aŭ Esperanto, kio povus tamen okazi flanke. La ĉefa celo de nia magazino estas antaŭenpuŝi internacian komunikadon kaj interŝanĝon de kulturo.

Dum mia tridekjara sperto kiel redaktoro, mi sufiĉe bone komprenas malfacilon realigi tion en eldonagado en Japanio. Malgraŭ tio, dezirante, ke ĉi-foja eldono fariĝu la semo por la venonta mondo mi realigis la fondon de la magazino. Tian troriskeman, malfacilan taskon kun la alta ideo mi intencas heredi de Zamenhof.

Dankon pro la legado de tiu ĉi longa mesaĝo. Mi elkore esperas, ke vi komprenu nian intencon.

Vi rajtas transpreni aŭ publikigi tiun ĉi mesaĝon libere, sed citante vi sekvu la originan formon kaj ne reformu, mi petas.

Ĉefedaktoro de "Esperanto Culture Magazine"
Prezidanto kaj Redaktoro de la Firmao Gutenberg Orchestra
Sugatsuke Masanobu
la 28an de decembro, 2020